

MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A.

# Oomoto


1  
9  
6  
7

Julio-Aŭg.

29-a Jaro N-ro 325-326 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo

## Sukcesa 52-a U.K. (Tel Aviv-Rotterdam)

2 — 9 aŭg., 1967



Malgraŭ la fakto, ke la 52-a U.K. devis organiziĝi dum nuraj 8 semajnoj, translokigite de Tel Aviv, ĝi bonorde finiĝis. Aliĝis 1253 kongresanoj, el kiuj pli ol 900 partoprenis. Ĉe la Fermo estis akceptitaj la Rezolucioj, kiuj i. a. alvokas al UN la plian evoluigon de la Propono de UEA, kun emfazo pri la internacia lingvo kiel potenca instrumento por atingi de amikaj rilatoj inter la popoloj.

La 6-an de aŭg., en Salono Yagi okazis (du-foje) la kunveno de Oomoto kaj U.H.A. kun ĉeesto de entute 400 kongresanoj, kiuj entuziasmiĝis pri la diversaj prezentaĵoj japaneskaj. (Laŭ la Kongresa Gazetara Servo)

# Vojo al la ora jaro

## Dudekjara plano de Esperanto-Movado, 1967-1987

Ĉi tiu estas la eseo de s-ro J. Umeda, premiita en la konkurso “Vojo al la centa jaro de la movado”, kiun organizis Japana Esperanto-Instituto, okaze de la 80-jara jubileo de la “Unua Libro”. Ĝia publikigo ĉi tie estas laŭ la permeso de JEI. — Red.

La antaŭvideblaj atingotaĵoj de l' Esperanto-movado en Japanujo kun fono de internaciaj kunlaboroj post 20 jaroj povas prezentiĝi en diversaj formoj. Tie ĉi, mi prezentos ilin en jenaj tri kategorioj de laboroj: 1) organizaj fortoj; 2) informaj laboroj kaj sistemigo de la edukado; kaj 3) praktikaj aplikoj.

Laŭ mia antaŭvido, tiuj ĉi tri kategorioj, post 20 jaroj, respondos respektive al la subaj atingotaĵoj: 1) la tutlanda organizo de esperantistoj en Japanujo stabiligĝas kun multflankaj subfakoj kaj kunlaborantaj organizaĵoj, kies fortoj entute multe pli antaŭenpuŝas la movadon; 2) informado pri la atingoj kaj aktivecoj de la internacia lingvo kaj de esperantistaj organizaĵoj estas ĉiam ajn havebla, kaj surbaze de tio, la enkonduko de esperanto en lernejojn fariĝas tute natura realaĵo kun sufiĉe da laŭgradaj instrumetodoj starigitaj kaj da instruistoj pretaj; kaj 3) en diversaj kampoj de la internaciaj kontaktoj kaj rilatoj la internacia lingvo estas oficiale aplikata, kune kun la enkonduko de esperanto kiel oficiala lingvo de diversspecaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj, kaj cetere ampleksiĝas literaturaj laboroj.

Laŭ tiuj miaj antaŭvideblaj atingotaĵoj, mi denun montros la vojojn direkte al la cent-jara jubilea tempo. Por tio, mi dividas la dudek jarojn en kvar periodojn, nome, I-a periodo = 1967 — 1972; II-a periodo = 1972 — 1977; III-a periodo = 1977 — 1982; kaj IV-a periodo = 1982 — 1987, respektive kun kvin jaroj da daŭro.

Antaŭ ol komenci la eksplikadon, mi devas klarigi pri tio, ke tiu ĉi tezo ne pritraktas la mondan situacion kunligitan kun tiuj 20 jaroj, kaj ankaŭ la grandegan progresadon en la sciencaj kaj teknikaj kampoj, kiuj

entute pli komfortigos kaj multe pli ŝanĝos la vivon de la homaro en la daŭro de la venontaj dudek jaroj.

\*

## 1) Organizaj fortoj (stabiligo de la tutlanda organizo)

En la I-a periodo, la esperantistoj en tuta Japanujo klopodas organizi distriktajn Ligojn surbaze de la lokaj grupoj kaj rondoj. Paralele, la fakaj organizaĵoj, ekzemple de sciencistoj, medicinistoj, religiistoj, k. s., kunordigas siajn labormediojn kaj firmigas la kunlaboron inter la membraroj. Japana Esperanto-Instituto tiuperiode pli fortigas sian gvidadon en akademia kampo de la esperantista movado; precipe okazas pli da eldonado de diversaj lernolibroj, vortaroj, terminaroj ellaboritaj de kompetentaj komisionoj el spertuloj kaj specialistoj. Intertempe, la japana esperantistaro maturiĝas fari kaj preni sur sin la gvidan rolon de la esperanto-movado en najbaraj landoj. Ankaŭ komenciĝas la renkontigo esperantista de la ekstereŭropaj landoj.

En la II-a periodo, la distriktaj Ligoj de Hokkaido norde ĝis Kyusyu sude iĝas pretaj havi tutlandan Federacion de la Ligoj. La Federacion konsistigas kiel membroj la Ligoj, kaj ankaŭ fakaj organizaĵoj aliĝas al ĝi kiel kunlaborantaj organizaĵoj. Japana Esperanto-Instituto (JEI) daŭrigas siajn laborojn kiel akademia centro de la esperanto-instruado kaj edukado. En la Federacio fondiĝas diversaj subfakoj por laboroj kaj informado por-kaj pri-esperantaj; unu el ili ekzemple estas Informa Centro (IC) kiu ĉiusemajne eldonas la informilon en kiu aperas novaĵoj pri tutmondaj laboroj kaj atingoj de la internacia lingvo.

En la III-a periodo, Japana Federacio de Esperantistaj Ligoj Distriktaj (JFELD) sendas al diversaj internaciaj renkontigoj siajn reprezentantojn kaj aron da interpretistoj por la praktika aplikado de la internacia lingvo, tiel ke la japana esperanto-movado ĝuas reputacion kiel motoro de la tutmonda esperanto-movado.

En la IV-a periodo, la internacia lingvo estas enkondukita en lernejojn kiel oficiala lernobjekto de la mezgradaj gelernantoj de la tuta mondo. JEI estas tiutempe jam rajtigita instanco por doni diplomon de la instruisteco kaj sekve stariginta la edukan fakon firma, de kiu la diplomitaj instruistoj daŭre estas sendataj al la lernejoj en la tuta lando.

## 2) Informaj laboroj kaj edukaj sistemoj (abunda informilo kaj specialigita eduka fako)

En la I-a periodo, kiel montrite en 1) JEI estas preta eldoni lerno-librojn kaj vortarojn. Sed ankoraŭ ne maturiĝas tiutempe la aĉetpovo de la publiko rilate la esperantaĵojn. Paralele, renkonte al Universala Ekspozicio en 1970 kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj okazantaj en tiu ĉi periodo, sufiĉe ampleksaj informiloj pri la internacia lingvo aperas por informa celo, tiel enfokusante la lingvan problemon de tiuspecaj internaciaj kontaktoj.

En la II-a periodo, komenciĝas kampanjo de JEI por starigo de la Kolegio por Instruistaj Esperantistoj, kiu poste ricevos de la Eduka Ministerio de Japania Registaro la saman rajtigon, kian ricevas la edukaj instancoj por donado de diplomoj al la studentoj. Samperiole, JFELD starigas IC (jam menciita), de kiu la amaskomunikaj organoj regule ricevas kaj, laŭ sia bontrovo, aperigas la novaĵojn pri la internacia lingvo kaj ĝiaj atingiĝoj diverskampaj.

En la III-a periodo, responde al la pligrandiĝo kaj -vastiĝo de la interŝanĝado de la informoj ĝeneralaj kaj specialfakaj tra la tuta mondo, IC projektas eldoni por monda cirkulado esperantlingvan semajngazeton, kiu pritraktas ne la aferojn internacilingvajn, sed la multflankajn kultur-temojn por ĝenerala intereso de la tutmonda publiko. JEI tiutempe iĝas agnoskita kiel akademia instanco, kiu rajtas doni diplomon pri la instruisteco en la internacia lingvo.

En la IV-a periodo, IC havas sian subfakon de la vidaŭd-kampa informado, kaj ĉi tiu partoprenas en la diversaj projektoj de kinoj kaj dokumentaj filmoj por aplikado de esperanto, kaj dissendas ne nur novaĵojn, sed ankaŭ necesajn personojn al la tutmondaj televidaj korporacioj por tradukaj laboroj, kaj ankaŭ por radio delegas personojn kompetentajn en tiu sfero.

## 3) Praktikaj aplikoj (enkonduko en internaciaj rilatoj kaj pliampleksigo de literaturaj laboroj)

En la I-a periodo, japanaj esperantistoj partoprenas en ĉiujaraj Universalaj Kongresoj de Esperanto per karavano, kaj ankaŭ en aliaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj reprezentante siajn respektivajn fakojn sciencajn,

komercajn, religiajn, k.s. Ankaŭ okazas en Japanujo mem Pacifika Kongreso de Esperantistoj, en kiu partoprenas esperantistoj ekstereŭropaj, kiuj malofte ĝis tiam povis viziti Universalan Kongreson kaj aliajn internaciajn renkontiĝojn esperantistajn, tiel ke ĝermas la solidareco de esperanto-movado en tiuj landoj.

En la II-a periodo, surbaze de la organiza forto de JFELD kaj JEI, komenciĝas grandskala kampanjo por enkonduko de la internacia lingvo en internaciajn kongresojn kaj konferencojn. Por tion helpi, eldoniĝas, krom informiloj, diverskampaj broŝuroj skribitaj en esperanto. Literaturaj verkoj originalaj kaj tradukaj ankaŭ vigle aperas. Ĉio ĉi apelas al la mondo pri la praktika utilo de la internacia kompreniĝo per la internacia lingvo.

En la III-a periodo, kunlaborantaj organizaĵoj de JFELD, nome, sciencista, komercista, religiista, k.s. post preparo en la lastaj periodoj, komencas organizi esperantlingvajn kontaktojn kun samspecaj instancoj en la mondo, kaj ankaŭ eldonadon de la terminaroj, kiuj estas utiligataj en tiukampaj instancoj kaj individuoj, kiel gvidiloj por internacia kompreniĝo.

En la IV-a periodo, ĉiuj ĉi supraj laboroj agnoskiĝas en multaj internaciaj instancoj kaj precipe en la monda supernacia organizaĵo, kiel solvoj por universaligo de la edukaj laboroj kaj internaciaj rilatoj multkampaj.

\*

En la supre prezentitaj vojoj ankoraŭ mankas multege pli da konkretaj kaj profundaj studoj pri la metodika kaj praktika aplikado de la laboroj. Estas memkompreneble, ke la laboroj priskribitaj supre en diversaj periodoj kaj kategorioj nature interplektiĝas unuj kun aliaj aŭ daŭre kunordiĝas; do ne pensu ke la laboroj estas nur portempaj.

Mem sciante pri tio, ke la tezo ĉi tie prezentita povus montri nur supraĵan perspektivon de la irotaj vojoj, mi tamen kuraĝis prezenti almenaŭ la de mi antaŭvideblajn atingotaĵojn de la Esperanto-movado en nia lando, esperante samtempe, ke ili iom post iom realiĝos en la daŭro de la venontaj dudek jaroj.

*La 31-an de majo, 1967*

# Sperto

de

## Zamenhof

Pli ol aliaj rasoj hebreoj ĉiam nepre bezonis lingvon internacian, ĉar ili vivadis dise tra la mondo kaj tamen havante komunajn religiajn interesojn.

Ili ja posedis tra la jarmiloj religian lingvon internacie uzatan de kleruloj kaj religiestroj, sed ne de la tuta popolo, nome la hebrean lingvon. La popolo kreis al si ĵargonon ankaŭ internacie uzatan, kiu jam akiris nun literaturan forton, eĉ originalan poezion, paralele kun la hebrea, sed neniel simila al ĉi tiu.

Sekve, la hebreoj posedas por sia raso du lingvojn internacie uzatajn parole kaj skribe. La hebrea havas glorajn tradiciojn, kaj estas amata kiel religia lingvo kaj deviga kiel Leĝa lingvo, la lingvo de Torah. Kiel religia lingvo ĝi estas lernata. Ankaŭ mi penas lerni ĝin!

Ĝis la unua duono de la 19-a jarcento ĝi estis mortinta, uzata nur de teologoj kaj filozofoj; sed genia judo nomata Eleazer 1) ben Judah, samtempano kaj kuracista kolego de Zamenhof, komprenis la bezonon de lingvo historia por la juda raso kaj per energia kaj persistema agado revivigis la lingvon de la Biblio kaj metis ĝin denove sur la lipojn de la popolo, eĉ de infanoj, kaj fine ĝi fariĝis oficiala lingvo de la Juda Ŝtato, kiam la hebreoj reakiris la sendependecon de Izraelo.

La unua lingvo de la infano Zamenhof memkompreneble estis la ĵargono de la kvartalo, kie li naskiĝis, sed en judaj lernejoj la hebrea estas devige instruata al geknaboj, kaj Zamenhof ĝisfunde ellernis ĝin, kiel ni povas konstati en la perfekta traduko de la Biblio, kiun li faris.

La juna Zamenhof do posedis spertojn pri la funkciado de du internaciaj lingvoj, uzataj mondscale de hebreaj rondoj en literaturo kaj parolo, kaj li konstatis laŭ la triumfo de Eleazer ben Judah la miraklan povon de lerta kaj persistema propagando gvidata tra la koroj, ne nur tra la cerboj. La propaganda laboro

1) — Eleazer (aŭ Lazarus) signifas: Helpato de Dio. En la hebrea eldono de “Fundamento de Esperanto” la nomo de la Aŭtoro estas: D-ro Eleazer Zamenhof. Sekve, Z. estis ankaŭ samnomulo de ben Judah. Ambaŭ estis *Helpatoj de Dio*.

de ben Judah por la hebrea lingvo parolis ĉefe al la sentoj de la judoj, montris al ili la nepran vivbezoon de posedo de historia, respektinda lingvo por restarigi la nacion kaj fari la hebreojn popolo honorata kaj respektata en la mondo. Kaj oni aŭskultis lin kaj revivigis la lingvon.

Vidante ne nur la hebrean rason kiel ben Judah, sed la tutan homaron, Zamenhof ŝvebis multe pli alte ol lia eminenta kolego, kaj uzis ĉefe la sentajn argumentojn por varbi pionirojn.

Ankaŭ por la konstruo de la lingvo la hebrea sperto estis al li tre utila: li profitis multe pli ol ekstere ŝajnas por simpligi la lingvon laŭ hebreaj modeloj.

Por la vortaro la hebrea neniel povis helpi, ĉar ĝiaj radikoj ne estas internaciaj; sed la gramatiko hebrea inspiris al Zamenhof multon tre bonan. Mi menciuj nur kelkajn trajtojn :

1-e. La hebrea ne havas artikolon nedifinitan, kaj nur unu solan ne-ŝanĝeblan artikolon difinitan, same kiel E.

2-e. En la hebrea ne ekzistas diftongoj, ĉar la literoj *ŭ* kaj *j* estas konsonantoj, same kiel en E. Kiom da malfacilaĵoj kreas la diftongoj por la akcento ni konstatas je ĉiu paŝo ĉe niaj naciaj lingvoj kaj en mortenaskitaj projektoj de L. I. La hebrea kaj E. ne konas tian malfacilaĵon.

3-e. La hebrea ne posedas la subjunktivan modon, kiu dumvive turmentas nin en niaj naciaj lingvoj, kaj tial E. ankaŭ ne konas ĝin.

4-e. Same kiel la hebrea, ankaŭ E. ne posedas specialajn formojn simplajn por distingi inter perfekte kaj neperfekte ĉe la verboj.

5-e. Nur nominativon kaj akuzativon havas la hebrea kaj E.

6-e. La finiĝo *-u* por la imperativo estas hebrea kaj araba, ne elpenŝaĵo kaprica de Z, kiel iam diris “reformisto”, kiu ĝin mallerte anstataŭigis per *-ez* (kiu ja ne ekzistas, ĉar en la franca ĝi estas elparolata kiel *é* aŭ *er*, sed ne *-ez*).

7-e. Same kiel en E. la hebrea vortaro estas aranĝata laŭ la radikoj.

Tiuj principoj, elprovitaj en la hebrea tra jarmiloj da vivado, konsiderinde simpligis kaj faciligis la Esperantan gramatikon; sed la ekstera aspekto de la lingvo laŭŝajne estas tute okcidenta, ĉar la internaciaj radikoj, afiksoj kaj gramatikaj finaĵoj estas okcidentaj. Mi diras “laŭŝajne”, ĉar la aglutinado en E. ankaŭ ne estas okcidenta, sed orienta.

Zamenhof ne nur estis genia homo, sed li posedis ankaŭ ekde la juneco spertojn, kiajn pluraj lingvistoj neniam akiras pri la ekzisto kaj strukturo de du lingvoj internacie funkciaj; tial li kreis mirindan lingvon kun perfekta sekureco laŭ vivantaj modeloj, kaj ĉiuj provoj

“reformi” ĝin fariĝis ridindaj fiaskoj.

El inter la spertoj de la Aŭtoro de E. estis ankaŭ tiu pri la bezono de netuŝebla fundamento. La netuŝebla fundamento de la hebrea estas la Biblio, en kiu neniu rajtas ŝanĝi aŭ korekti ion ajn; eĉ la plej evidentan eraron oni neniam korektas en la hebrea Biblio. Oni nur mencias en la margeno de la paĝo, kiel oni devas korekte legi la eraran vorton, sed tiu ĉi restas kaj estas eterne kopiata aŭ represata sen ŝanĝo.

Tiu neŝanĝebleco de la modela teksto eternigis la unuecon de la hebrea lingvo tra la mondo.

Z. kreis netuŝeblan Fundamenton por E. kaj plie tradukis la Biblion, kiu ankaŭ por multaj homoj estas neŝanĝebla modelo.

La angla traduko de la Biblio ankaŭ fariĝis klasika modelo por la angla lingvo, kvankam en ĝi estas eraroj; ekzemple, la 16-a paragrafo de la ĉapitro dua de Hoŝea tekstas jene en la angla traduko:

*“And it shall be at that day, saith the Lord, that thou shalt call me Ishi; and shalt call me no more Baali.”*

La anglaj tradukintoj faris pli ol unu eraron en tiu paragrafo:

1-e. ISHI = mia edzo, kaj BAALI = mia mastro, ne estas propraj nomoj kaj ne povus resti en la origi-

nala lingvo.

2-e. La pronomo *thou* devus esti *she*, kaj la verbo *shalt*, dufoje uzita, devus esti *shall* (aŭ *will*). La hebrea verbo *tikri* estas dusenca: *ci nomos*, kaj *ŝi nomos*. Nur laŭ la senco oni povas decidi, kaj en tiu teksto Dio parolis al la profeto pri la virino, ne al la virino, sed la anglaj tradukintoj dormetis kaj eraris.

Mi komparis la tradukon de Z. kun la originalo kaj trovas ĝin tute korekta. Ĝi tekstas: “En tiu tempo, diras la Eternulo, ŝi nomos Min: Mia edzo; ŝi ne plu nomos Min: Mia mastro.”

La traduko de Z. estas tre lerta. Kvankam ISHI kaj BAALI ambaŭ signifas “edzon”, estas grava nuanco inter ili: ISHI estas mia viro, mia amato; dum BAALI estas la aĉetinto de la virino, la posedanto laŭ antikva rajto, sekve li povas esti malamata edzo, ĉar li estas mastro de la virino. Dio volas esti la amato, ne la mastro de la homaro. Laŭ la teksto de Hoŝea, virino estas uzata en la senco de homaro.

Malgraŭ eraretoj de traduko, la angla teksto estas modelo kaj eĉ ateistoj studas ĝin. Nu, la sperto de Z. donis al ni ankaŭ tiajn neŝanĝeblajn modelojn. Nun la fiasko de la ŝanĝeblaj projektoj jam konvinkis nin ĉiujn pri la praveco de tiaj neŝanĝeblaj fundamentoj kaj ni ĉiuj defendas ilin kontraŭ la reformistoj.



## Kie la ŝuo pinĉas

En tiu ĉi lando (Nov-Zelando) kaj la plejmulto el aliaj, edukado estas deviga ĝis iu grado kaj senpaga ĝis pli alta grado; tiuj kiuj montriĝas sufiĉe kapablaj rajtas progresi ankoraŭ pli alten per stipendioj.

Ne ĉiam estis tiel. Estis tempo, kiam edukado estis preskaŭ sole por la infanoj de tiuj, kiuj povis pagi por ĝi; kaj edukado, kune kun ĝiaj profesiaj kaj sociaj avantaĝoj, estis privilegio de tiaj personoj.

Pro socia evoluado, la proporcio de la popolo kiu akiris sufiĉan edukadon senĉese pliiĝis, tiel ke jam de iom da tempo ĝi ampleksas la

---

Certe la lingvo kreskos kiel nun kreskas la hebrea en la moderna uzado, sed oni ĉiam respektos la neŝanĝeblajn modelojn. Tiuj modeloj por ni estas “Fundamento de Esperanto”, “Fundamenta Krestomatio”, “La Biblio” k. a. verkoj de nia genia majstro.

(El I. G. Braga: “VETERANO?”, 2-a reviziita kaj pligrandigita eldono de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro GB., Brazilo).

tutan komunumon.

Dum ĉi tio okazadis, tiuj kies infanoj ĝuis edukadon monopolon, kiel proprajon de nur kelkaj el tiu socia klaso, konstatis ke ilia privilegio senĉese malpliiĝis ĝis nenieco. Sekve ili rigardis tion ĉi malaprobe kaj ofte kontraŭis la movadon kiu celis edukadon por ĉiuj. Pro tio ke la vera motivo estis malfacile defendebla, plej ofte ili atakis ĝin pro aliaj kaŭzoj, laŭ mensa procedo kiun oni nomas “raciigo”, kiu povas esti intenca sed estas pli ofte senkonscia.

Malgraŭ ĉiuj argumentoj, efektivaj kaj raciigitaj, preskaŭ ĉiuj homoj nun konsentas ke universala edukado estas ne nur bona afero, sed ankaŭ nepre necesa afero, kaj ke estonte ni devos havi eĉ pli, certe ne malpli. Nuntempe oni tute ne aŭskultus al tiuj, kiuj iam kontraŭargumentis, kaj ni agnoskas ke necesis ke ili perdu la privilegion pro nura justeco kaj la komuna bono, kiom ajn tio malutilus al ili.

Nu, plejparto de la nuntempaj kontraŭantoj okupas ĝuste tiun lokon. La lingva problemo, kia ĝi nun ekzistas, kreis privilegiojn por kelkaj, kaj tiujn privilegiojn ili deziras teni. Ili estas el du specoj: la unuan privilegion posedas indiĝenaj parolantoj de unu el la ĉefaj lingvoj, kaj tio inkluzivas nin (t.e. la novzelandanojn). Ilia lando ĝuas gravan privilegion en komerca, diplomacia

kaj socia vivo, kaj ĉesigo de tiu privilegio povus esti malbona por kelkaj.

La alian privilegion posedas tiuj el “minoritata lingva” nacio, al kiuj ne mankis la tempo (multaj miloj da horoj) kaj la mono por akiri bonegan konon pri unu aŭ pli el la “grandaj” lingvoj. En la propra lando, ili formas privilegian grupon, pro tio ke multaj el iliaj oficoj estas atingeblaj de neniuj aliaj; la lingva kvalifiko estas nepra.

Evidente nek unu nek alia el tiuj grupoj deziras sperti okazon en kiu la necesa kvalifiko fariĝus laŭrajta posedaĵo de ĉiu lerneja infano je kosto de kelkcent studhoroj. Tio signifos perdon de socia distingo por iuj, kaj eĉ ekonomian malfacilecon por aliaj, kiam ĉiuj troviĝas sur la egala lingva bazo, kiel ni celas.

En nia propra lando (Nov-ze-lando) nin trafas kontraŭstaro ĉefe el la unua el tiuj grupoj, kaj en internacia agado kiel ĉe Unuiĝintaj Nacioj estas ambaŭ grupoj, ĉar eniro en tiujn agkampojn estas ebla nur por anoj el tiuj du grupoj.

Kiel ĉe kontraŭstaro al universala edukado, raciigo produktas aliajn argumentojn kontraŭ ni, kaj plej kuriozaj estas la plejmulto el ili; sed oni ne povas nei ke ĉefunde la veraj kialoj estas la diritaj. Ni ne povas nei ke tio, kion ni celas,

kaŭzos prestiĝperdon al iuj kaj ekonomian embarason al aliaj, sed la bono al tiom multaj homoj multe pli gravas ol tio ĉi.

Grandega kvanto da talento estas subpremata de la lingva problemo; ĝia liberiĝo alportos ĝeneralajn pliboniĝojn samspecajn al tiuj, kiuj venis pro universala edukado, por nenion diri pri la justeco farenda al tiu talento. Tiuj, kiuj kontraŭstaras, ĉar ili timas konkurencon, havas nek moralan nek racian pravigon.

(elangligo de sia propra artikolo publikigita en “New Zealand Esperantist”)



Gejunuloj amase subskribis por Oomoto fininte la 5-tagan E-kurson en Kameoka

*Ĝis revido! Sayonara!*

サ ヨ ナ ラ

De la Festival' de Oomoto  
mi konservis kvazaŭ estus foto  
belan scenon de la adiaŭo,  
“ĝis revido” kaj la “ĝis baldaŭ”.

La scenejo estis ja la bord' rivera  
de la Hozu, pro rapido tre fiera.  
Tie kolektiĝis nun la amikaro  
por boatveturo bela al montaro.

Ĉiuj gastigantoj svingis flagojn,  
ĉiuj gastoj dankis belajn tagojn.  
Ĝojo ja miksiĝis kun melankolio,  
la fanfaro kun malgaja melodio.

Fine venis horo de foriro nia,  
en boatoj sveltaj jam ni sidis,  
kaj per stangoj fortaj viroj gvidis  
la boaton al la flu' rapida plia.

Sur la bordo kaj eĉ ĝis en fluon  
sekvis nin amikoj kun flagetoj;  
plenkreskuloj kiel infanetoj  
ne atentis la malsekan ŝuon  
por nin sekvi tiom longe kiom eble estus,  
kaj per akompano la kontakto restus.

Dume nun la fluo la boaton prenis,  
kiu pli rapide al la mezo venis.  
Jam de malproksime gestoj la salutaj,  
pro foreco ili nun fariĝis mutaj.

Ĝis ĉe kurbo de l' rivero montris sin  
nova panoramo, kiu ravis nin :  
inter montoj verdaj, belaj — kia ĝojo —  
vigle serpentumis la rivera vojo.

Pro mallargô nun la fluo tre rapidas ;  
“kun la vivo en la manoj” ni ja sidas,  
ĉar vidiĝas antaŭ ni la krudaj rokoj ;  
por la barko ŝajne mankas lokoj !

La ŝipeto kiel sago flugas,  
ŝaŭmaj ondoj en torento muĝas.  
“Dancas la barko kiel folio”;  
time jam kelkaj preĝas al Dio.

Tamen la spertaj gvidistoj ne fuŝas ;  
ili per stangoj al rokŝtonoj puŝas.  
Pasas la barko sen iu difekto  
lerte gvidata laŭ ĝusta direkto.

Trankvile denove nin portas la fluo  
ĝis nova renkonto kun ŝaŭmo kaj bruo.  
Ŝtonegoj kaj rokoj laŭforme groteskaj  
alternas kun scenoj la plej pitoreskaj.

Largiĝas la fluo al lago simila  
kun verdaj deklivoj — aspekto plej brila ;  
Sovaĝa arbaro kun riĉa vario  
beligas la bordojn — kolorsimfonio !

La flava bambuo kun helverda krono  
en vico unua kontrastas al fono  
de pino kaj tujo majesta, malhela,  
jen ruĝa acero, gajeca kaj bela.

Ĉe mi amikino la sidlokon havas,  
kaj kune ni ĉion ensorbas kaj ravas.  
Pro senpera ĝojo kaj ĝuo ŝi ridas,  
kaj ŝian plezuron kun ĝojo mi vidas.  
Ŝi banas piedojn en ŝaŭmo kaj ondo,  
donacas humoron kaj ĉarmon al l' rondo.

Dum ni glitas inter verdaj montoj,  
venas ni al novaj ĝojo-fontoj :  
junularo ĉie sur la bord' kaj sur deklivo  
sin amuzas, ĝuas, ĝojas pri la vivo.

Certe loko por ekskursoj preferata ;  
nin salutas junularo nekonata.  
Ĉarma junulino, en la manobranĉo,  
ŝi al ni ridetas — estas ja dimanĉo.

Kelkaj al la barko lerte naĝas  
kun biero, varma rizo kaj donacas  
al fremduloj ni kiel amika gesto ;  
vere pri gastamo bela manifesto !

Kaj al ĉiuj de la gaja aro  
ni deziras danki, sed la lingva baro  
la komprenon vortan malpermesas.  
Vere Esperanto tre necesas !

En japana lingvo ili vigle krias,  
sed pri la enhavo ni nenion scias ;  
iomete nur ni konas de frazara  
libro : “Ĝis revido !” — “Sayonara !”


Kun bedaŭro baldaŭ venis ni al celo  
de l' mirinde brila veturada belo ;  
sed restadas tamen ĉiam la memoro  
gravurita ja profunde en la koro !

David Jordan (el Usono)

## La insulo Tajvano : historia skizo

Dum mi ĉi tiujn liniojn skribas, mi sidas ĉe la pordo de budhana templo staranta alte sur la monto, kaj mi vidas, kiel majeste la flavruĝa vespera suno malsupreniras post la nuboj malaltaj super la maro. Inter mi kaj la suno kuŝas ankoraŭ du montoĉenoj pli malaltaj ol ĉi tiu monto, kaj transe la platplata ebenaĵo kie oni povas distingi ĉiun kampon malgrandan, kaj kelkajn negrandajn lagojn, videblajn tra la nubetaĵo.

La lando estas la insulo Tajvano, kaj la monto estas unu el la montaro kiu etendiĝas de la plej norda ĝis la plej suda parto de la insulo, kovrita de riĉaj vegetaĵoj kaj hejmo de kelkdek miloj de “indiĝenoj”, kiuj posedas fizikajn kaj kulturajn rilatojn kun la popoloj de Filipinio kaj de la pacifikaj insuloj. La “indiĝenoj” dividiĝas en sep aŭ pli multajn tribojn (laŭ malsamaj kalkulmetodoj), kiuj ĉiuj vivas sur la montoj, kaj parolas malajopolineziajn lingvojn, aŭ plej laste la japanan. “Indiĝenoj” estas eble du procentoj de la tuta tajvana loĝan-



taro.

Larĝa ebenaĵo etendiĝas paralele kun la montaro en la okcidenta flanko, atingante la bordon de la maro. (Ĉe la oriento ne estas plataĵo, ĉar la montoj kliniĝas ĝis ĉe la marbordo en belega kontrasto.) En la insulo produktiĝas multspecaj agrikulturaĵoj: arakidoj, bananoj, sukero, rizo, faboj, ananasoj, akvomelonoj, pro kiuj Tajvano estas rimarkenda. La ebenaĵoj estas “tajvanuloj”, kies prapatroj grandparte venis en Tajvanon el Ĉinio kontinenta.

Dum la granda avidemo de imperioj, kiu estris la pensadon de eŭropaj politikistoj ek de la tempo de la malkovro de la Amerikoj preskaŭ ĝis hodiaŭ, oni ne preterlasis Tajvanon. Portugalaj ŝipoj laŭiris la bordojn malfrue en la dekseca jarcento, kaj, rimarkinte la belecon de la insulo, nomis ĝin *Ilha formosa* (bela insulo). Ĉi tiun nomon ili skribis sur siajn mapojn, kaj en okcidentaj lingvoj la vorto “formosa” restis la nomo de la insulo ĝis la fino de la dua mondmilito, kiam oni anstataŭigis ĝin per la malpli belidea

ĉina nomo : *Tajvano* 台灣 (TAIR-UAN/tái-wān : “podia golfo”).\*

En 1624 la ĉinoj, kiuj ĝis tiam neniam pretendis posedi la insulon, ĝin tamen cedis al la holandanoj, kondiĉe, ke ĉi tiuj transiru el la marbordo de Fuĵjeno 福建 (FWU-JIANN / fú-jiàn)-provinco en la Peskadorajn Insulojn 澎湖 (PEN-RNG-HWU / péng-hú : “ondsonaj lagoj”) kaj en Tajvanon, kaj tiel pli malproksimen for de Ĉinio. La nederlandanoj okupis la insulon ekde la sekvanta jaro, kaj konstruis fortikaĵojn “Zelandia” kaj “Providentia”, ambaŭ en la nuna Tainan-urbo 台南 (TAIR-NAN/tái-nán) en suda Tajvano.

Tio signifas, ke, kiam la prapatroj de la nuntempaj tajvanuloj venis en Tajvanon, ili venis al tiu Nederlanda Tajvano. Kvankam probable ĉinoj pli frue migris en Tajvanon (eble tiel frue kiel la dekdua aŭ eĉ la sesa jarcento), la unuaj vere multnombraj enmigrantoj estis ĉi tiuj rifuĝintoj venintaj el la provincoj Fuĵjeno kaj Guandongo 廣東 (GOANG-DONG/guáng-dōng)

je la fino de la Ming-dinastio.

Ĉi tiuj migrantoj, kies fuĵjenprovinca parolmaniero estis ege mal simila al tiu de aliaj partoj de Ĉinio, organiziĝis sub la estreco de eks-pirato veninta de la sudorienta marbordo de Ĉinio kaj nomata 鄭成功 (JENQ CHERNG-GONG/zhèng chéng-gōng) en la ĉina lingvo, kaj “Koksingo” en okcidentaj lingvoj. Je la tempo de la falego de la Ming-dinastio, kiam frue en la dek-sepa jarcento eniris en Ĉinion la manĉurianoj, Koksingo asertis sian sendependecon dis de la centra registaro. Sed poste la imperiestro devis fuĝi el la ĉefurbo, kaj Koksingo konsentis helpi lin, kondiĉe, ke la imperiestro legitimu la pozicion de Koksingo mem ; kaj laŭ tiu konsento farita li fariĝis subtenanto de la Ming-dinastio. Sed li ne sukcesis restarigi la dinastion. En 1661 li devis fuĝi kun siaj armeo kaj subtenantoj en Tajvanon. Ekde tiu jaro, proksimume 100,000 personoj transloĝis en Tajvanon kiel politikaj elmigrantoj.

Koksingo ne nur kondukis en la

\* La ĉina lingvo malfeliĉe nun uzas multajn sistemojn de latinskribado kaj en Ĉinio kaj eksterlande. Mi ĉi tie uzas du : la unua, presita en MAJUSKLOJ, estas “Gwoyen Romatzyh”, laŭleĝa skribformo en Tajvano. La dua, en minuskloj, estas la laŭleĝa skribformo sur la kontinento. Mi rimarku, ke ĉinoj ĝenerale malamegas latinajn literojn kaj grandparte ne povas uzi ilin por skribi sian propran lingvon. Do kaj en Tajvano kaj sur la kontinento oni trovas grandskalan mispresadon kaj uzadon de aliaj sistemeroj. En okcidento oni ofte malklopode preterlasas la indikon de tonalteco, kiu ankaŭ estas grava parto de la ĉina lingvo. Tiu preterlaso estas egale erara.



Koksingo

insulon la unuan gravan grupon da elmigrantoj ĉinaj, sed ankaŭ ludis alian gravan rolon en la tajvana historio: li forpelis la nederlandanojn el la insulo per granda militbatalo. Poste, kvankam la ideo de la insulestro estis reiri al la kontinento, tamen Tajvano restis efektive sendependa nacio ĝis 1683, kiam la nepo de Koxingo kapitulis kaj cedis la Insulon Belan al la nova Ĉing-dinastio, kaj Tajvano fariĝis parto de Fujjen-provinco ĝis 1886, kaj poste fariĝis por la unua fojo provinco ĉina.

Plej bone ni ne forgesu ankaŭ alian grupon da nuntempaj tajva-

nanoj, kiu enmigris en Tajvanon proksimume tiam, kiam la “tajvanuloj” venis. Ili nomiĝas “hakoĵ” 客家人 (KEH-JIA-REN/kè-jia-rén: “gasta popolo”). Kvankam ili verŝajne “origine” loĝis en norda Ĉinio, ili probable migris en la sudon dum la Tang-dinastio, kaj je la fino de la Ming-dinastio ili loĝis ĉefe en Guangdong, kie ili ofte transloĝiĝis kaj tial malofte posedis bienon. Multaj el ili migris en Tajvanon dum la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj, speciale post la malsukcesa Tajpinga 太平 (TAY-PYNG/tài-píng) Ribelo, en kiu hakoĵ estis gravaj partoprenantoj. Malsama lojaleco inter la ribelistoj kaj la fidelistoj, hakaj kaj nehakaj, kaŭzis malbonan senton. Ankaŭ la grandiganta guandong-provinca “hakaro” devigis ilin transloĝi el la montoj sur la ebenaĵojn en la dek-oka jarcento. Sed la bieno sur la ebenaĵo jam estis en la posedo de la “guandonguloj”. Veraj bataloj okazis, kaj en 1862 la hakoĵ ek-malgajnadis kaj moviĝadis al la marbordo. En 1866 la registaro frakasis la restantajn kaj multaj el ĉi tiuj fuĝis en eksterlandon, inkluzive de Tajvano.

Hodiaŭ la hakoĵ, samkiel la “indiĝenoj”, estas nacimalplimulto (proks. unu miliono da hakoĵ loĝas en Tajvano), el multaj vidpunktoj nedistingebla de la “tajvanuloj”. Sed la du grupoj ankoraŭ restas apartaj



unu de l' alia kaj ne interredziĝas. La tajvanuloj estas sociale pli altaj ol la hakoĵ: ili ofte povas paroli la tajvanan (fuĵĵenan), sed tajvanuloj malofte povas paroli la hakan.

La sekvinta grava dato en la historio tajvana estas 1895, ĉar en tiu jaro la ĉina registaro cedis la insulon "poreterne" al la japana imperio. La tajvananoj kontraŭstaris ĉi tiun agon, kaj, furioze, senespere, deklaris sin respubliko, sub la superestreco de la Ĉing-dinastio. Sed la japanoj envenis kaj sukcesplene okupis finfine la tutan insulon. Ĝi restis en la posedo de la japana imperio dum 50 jaroj, ĝis Japanio kapitulis al la aliancanoj je la fino de la dua mondmilito.

Dum la japana epoko oni komencis grandskale la konstruadon, kiu estas la skeleto de la hodiaŭaj tajvanaj industrio kaj urbigado. Vojojn kaj pontojn oni konstruis, kaj ankaŭ digojn kaj fabrikojn. Oni plibonigis la komunikilarojn, instalis elektrofostojn kaj fadenojn, ktp. Plej grave, la edukado sisteme pliboniĝis kaj ĝeneraliĝis ĝis plej bona grado en la ĝistiamaj tajvanaj historio. Lernejoj uzis la tajvanan (fuĵĵenan) lingvon, sed instruis ankaŭ la japanan. Eĉ ja hodiaŭ kelkaj mezaĝuloj kaj maljunuloj eĉ en malgrandaj vilaĝoj ankoraŭ povas facile skribi kaj paroli la japanan. Por pacemigi la rilatojn

inter la "indiĝenoj" kaj la "tajvanuloj" kaj, pli grave, inter la "indiĝenoj" kaj la registaro, la japanaj estroj transloĝigis kelkajn tribojn kaj la rezulto estis la uzado de la japana kiel interlingvo inter montaj triboj, ĉar la montaj lingvoj, ve, estas intertribe nekompreneblaj. Parte baze sur tiu komuna lingvo, la divers-tribaj "indiĝenoj" interamikiĝis iom, kaj iliaj komercaj rilatoj kun la "tajvanuloj" ankaŭ estis pli konvenaj ol antaŭe.

La japanoj iom estis ofendaj el tajvana vidpunkto, kompreneble, kiel ekzemple kiam ili decidis bruldetruigi statuon de la diino Madzu 媽祖 (MHA-TZUU/mā-zū) de la grava templo en Ŝigango 西港 (SHI-GAANG/xī-gǎng) norde de Tajnan-urbo. (La tajvanuloj konspire ŝtelis kaj kaŝis la statuon. Post la milito la



Tajvano antaŭ la alveno de nederlandanoj kaj de ĉinoj

diino reiris al sia templo kaj ankoraŭ restas tie.) Tajvananoj ankaŭ malŝatis adorkulton de la imperiestro japana. Je la fino de la milito, kiam la insulon oni cedis al la Nacipopola Registaro 国民党 (GWO-MIN-DA-ANG/gúo-mín-dǎng) de suda Ĉinio, la japanajn templojn grandskale kaj plenkore oni detruis; ĝis hodiaŭ nur restas kelkdek, kiujn neniu rebonigas kaj kiujn naturo kaj tempo baldaŭ ruinigos.

Sed grandparte la tajvananoj tre japaniĝis dum kvindek jaroj sub la japana estreco. Ili ne nur komencis dormi sur tatamo kaj manĝi japanstile, kanti japanajn kantojn kaj legi japanajn librojn, kaj finfine komencis senti sin japanoj. Kaj ili miris je la administracio kapabla, malgranda, kaj nekoruptebla: tri virtoj, kiuj mankis al la tradicia ĉina regsistemo. Eble, se je la militfino Tajvano estus restinta parto de la japana imperio, la popolo hodiaŭ estus iaj japanoj.

Sed ekde la japana kapitulo en 1945 la kultura movado en Tajvano denove turnis sin al Ĉinio. Dum la jaroj inter 1945 kaj 1949 la dua granda enmigrado el la kontinento okazis, kaj venis pli ol miliono da novaj migrantoj kun la retiriĝanta Nacipopola Armeo. Ĉi-foje la migrantoj estis grandparte de norda Ĉinio, kaj parolis la dialekton de Pekino kaj ĝiajn rilatajn dialektojn.



Vilaĝo de ĵusvenintaj ĉinaj migrantoj en la 17-a jarcento

La nacipopolistoj, kiuj ricevis Tajvanon de Japanio en 1945 kaj faris ĝin provinco de Ĉinio, nun scias, ke ĉi tiu provinco estas por ili la sola restaĵo de la lando. Ili nomis ĝin 宝島 (BAO-DAO/bǎo-dǎo: “insulo trezora”), kaj de tie ili planas iun tagon reiri sur la kontinenton kaj refondi sian registaron. Sed intertempe ili laboras por plibonigi kaj plifortigi Tajvanon mem. En 1963 la loĝantaro de Tajvano estis preskaŭ dek du milionoj kaj el ili proksimume miliono kaj duono estis venintaj el la kontinento.

Tre nature estas, ke komence estis iaj problemoj. Sur la kontinento oni antaŭ multaj jaroj estis deklarinta, ke la pekina estu la “nacia lingvo”, sed la tajvananoj ne povis ĝin paroli. La kontinentuloj, kies unua ideo tute ne estis poreterne

transloĝiĝi en Tajvanon, ne volis lerni la tajvanan, sed insistis, ke la tajvananoj lernu la “nacian lingvon.” En 1946 la tajvanaj lernejoj devige “pekiniĝis,” kaj la Imperia Universitato en Tajbejo 台北 (TAIR-BEEI/tái-běi) pekiniĝis simile. En ĉiuj mezlernejoj oni iel devige instruis la anglan, kaj tute forlasis la japanan, kiu el la kontinent-ĉina vidpunkto estas lingvo de eksmalamika lando. (Bedaŭrinde la progreso en la angla en Tajvano estas aĉega, kaj la multa tempo, kiun ĉiu mezlernejo devas uzi por lerni ĝin estas preskaŭ tute senprodukta. Por ĉinoj eble la japana estas pli konvena studobjekto ol la angla.)

La nacia registaro mem ankaŭ transvenis en Tajvanon, kaj tie ĝi

estis nature pli alta ol la provinca registaro, kiun oni organizis en 1945. Ankaŭ pro ĉi tio estis kontraŭsento, ĉar la nacia registaro, kvankam de 1949 ĝis hodiaŭ ĝi estras nur Tajvanon, enhavas delegitojn de ĉiuj provincoj de nacipopolista Ĉinio, kaj tio permesis al la ĵusvenintaj kontinentuloj estri la insulon. Sed samtempe la registaro efektivigis multajn bonajn ŝanĝojn, plej notinde la “bienreformon”, kiu tute malestigis la klason de riĉegaj bienposedantoj, kaj tio sukcesplene rezultis je vere pli feliĉa bidenta situacio.

La tempo nun estas pasinta, kaj la nova generacio de tajvanuloj kaj de kontinentuloj pli grandigis — ĉiuj kiel “tajvananoj”. Multaj el ĉi tiuj kontinentuloj parolas la tajvanan,



Nederlanda fortikaĵo “Zeelandia”

kaj la tajvanuloj en lernejoj pli kaj pli trovis facilecon de la pekina “nacia lingvo”. Ĉiuj kutimiĝis al la registaro. Inter la kelkaj homgrupoj de Tajvano, dank’ al amas-kaj interkomunikado, regas pli kaj pli da harmonio. Kaj hodiaŭ Tajvano estas riĉa, feliĉa insuleto.

Tamen estas rimarkinde, ke la malnovaj tajvanaj tradicioj ankoraŭ floradas malgraŭ la ŝanĝiĝo de la socio: tradicioj portitaj el Fuĵjeno-provinco, kiam ĉinoj unuafoje venis en Tajvanon. La recedo al Ĉinio okazis precize en la bona momento por certigi, ke la insulo restu ĉina, ne japana. Je lingvoj, religioj, moroj, kaj ĝeneralaj aspektoj, restas malmulto el la japana okupado krom la uzado de tatamoj.

..... Sed la suno jam malsupreniris. Sonorilego de la budhana templo profunde sonoras, kaj mi scias, ke la vespermanĝo estas nun preparita. Preĝistino, parolante en la “nacia lingvo”, kondukas min al speciala ĉambro. Tie mi manĝos nur vegetaĵojn, ĉar en tajvanaj budhanaj temploj oni ne manĝas viandaĵon. Post la vespermanĝo ili adoras la Budhon. Poste ili dormos. Kaj mi, eble post iom da tempo, rigardante la sudĉinan nokton, ankaŭ dormos, ĉar morgaŭ mi iros al mia vilaĝo sur la larĝa tajvana ebenaĵo.

## Utilaj libroj

AVIDSON, James W.: The island of Formosa, 1903 (Tajvana represo) (angla)

FERNG Tzuoh-min: Tair-uan lihshyy bayjeang, 1966 (Tajbejo, Presejo de Junula Kulturo) (ĉina)

(Féng Zùo-mín 1966 Tái-wān li-shī bài-jiǎng) 馮作民 1966 台灣歷史百講

HSIEH Chiao-min: Taiwan — ilha formosa, 1964 (Londono, Butterworths.) (angla)

JĴEN Ju-di: Konkiza geografio de Ĉinio, 1965 (Pekino, Ĉina Esperantoligo) (Esp.)

LIN Herng-daw: Tair-uande lihshyy jeu minswu, 1966 (Tajbejo, Presejo de Junula Kulturo) (ĉina)

(Lín Herng-dào 1966 Tái-wān-de lì-shī yǔ mǐn-sú)

林衡道 1966 台灣的歷史与民俗



En angulo de la 52-a U. K.



- ĈINKI < *tinctuur* ) : farmacia tinkturo.
- ĈOKKI < *jak* (jaketo) : veŝto.
- DEKKI < *dek* (ferdeko)
- DOKKU < *dok* (doko)
- † DOKUTORU < *doctor* ) : kuracisto → DOKUTĀ < A *doctor*.
- † DONTAKU < *zontag* (dimanĉo) : dimanĉo, ferio.
- DOROPPU < *drop* (bombono) [eltiraĵo, esenco.
- EKISU ← EKISUTORAKUTO < *extract* (ekstrakto) : densigita ↘
- † EREKI ← EREKITERU < *electriciteit* (elektro) : revivigita en la  
moderna kunmetaĵo EREKI-GITĀ < Ho + A *gitar* (elektra gitaro).
- ĒTERU < *ether* (etero)
- GARASU < *glas* (vitro)
- GIPUSU < *gips* (gipso)
- † GIJAMAN < *diamant* (diamanto) : 1) diamanto, per kiu oni tranĉis ✓
- GOMU < *gom* (gumo) [ vitroplaton ; 2) vitraĵoj.
- GORO/GOROHUKU 呉紹服 ← GOROHUKURIN < *grof grein* (aspra  
teksaĵo, kamloto)
- † HANDON < [ Jp *han-* (duon-) + *don* (Ho *zontag*) ] : duonferio, sabato.
- HAPPU ← PAPPU < *pap* (kataplasmo)
- HATORON-ŜI < [ Ho *patroon* + Jp *ŝi* ] (kartoĉ-papero) : en la mo-  
derna epoko, la komuna nomo de bruna papero uzata por banderoloj,  
kovertoj, kovertegoj, pakpaperoj ktp. Vd NOTON 1.
- HENRŪDA < *wijnruit* (ruto)
- HETTO < *vet* (graso) : porkograso fandita kaj rafinita.
- HOKKU < *hoek* (hoko) : vesta hoketo, agrafio.
- HŌSU < *hoos* (kranakva tubo fleksebla)
- HUKURIN ← (GORO) HUKURIN (< *grof grein*) : teksaĵo ne tre  
densa, el lano pli delikata kaj mola ol tiu uzata por kamloto ;  
simila al muslino. Antaŭ ĉ. 100 jaroj ĝi estis importita en nian  
landon pere de Nederlando.
- INKI ← INKITO < *inkt* (inko)
- JOĴŪMU-ĈINKI < *jodium-tinctuur* (joda tinkturo) = JODO-ĈINKI ✓
- ĴIGITARISU < *digitalis* (digitalo) [ < G *Jodtinktur*.
- KAN < *kan* (ladskatolo)
- KANHURU < *kampher* (kamforo)
- KINĪNE < *kinine* (kinino)

- KANTERA < *kandelaar* (kandelingo) : kandela aŭ olea portlanterno ✓  
 KARAN ← KARĀN < *kraan* (krano) [ofte el metalo.  
 KARINTŌ < [*kringelen* (kringo) + Jp *tō* (sukeraĵo)]: fritita pasto-  
 kuko (laŭ la E-Japana Vortaro de J. Okamoto, 1935), sed pli ĝuste :  
 fritita kringo (tre seka). Vd NOTON 2.  
 KARUKI/KARUKU < *kalk* (kalko)  
 KATĒTERU < *katheter* (katetero)  
 KIRUKU/KORUKU < *kurk* (korko)  
 KŌHĪ < *koffij* (kafo)  
 KOKKU < *kok* (kuiristo)  
 KONPASU < *kompas* (kompaso) : kompaso, cirkelo.  
 KOPPU < *kop* (taso) : glaso.  
 KORERA < *cholera* (ĥolero)  
 MADOROSU-PAIPU < [*matroos* + A *pipe*] (marista pipo) : hibrida  
 kunmeto en la moderna epoko por distingigi la eŭropan pipon  
 disde KISERO (kies bildon vd en Enciklopedieto Japana).  
 MANGAN < *mangaan* (mangano)  
 † MERIKI/MERUKI < *melk* (lakto) → MIRUKU < A *milk*; Jp ✓  
 MESU < *mes* (bisturio) [gjunjū.  
 NIKKERU < *nikkel* (nikelo)  
 NISU ← ŬANISU < *vernis* (verniso)  
 OBURĀTO < *oblaat* (oblato)  
 † ORĪHU < *olijf* (olivo) → ORIIBU < A *olive*  
 ORUGŌRU < *orgel* (muzikskatolo)  
 PEN < *pen* (skribplumo)  
 PENKI < *pek* (peĉo) : farbo por dompentrado = PEINTO < A  
*paint*. Akvarela aŭ oleopentra farbo estas Jp *enogu*.  
 PESUTO < *pest* (pesto)  
 PINSETTO < *pincet* (pinĉileto)  
 PINTO < *punt* < *brandpunt* (brulpunkto) : 焦点 fokuso.  
 PONPU < *pomp* (pumpilo)  
 PONSU < *pons* (punĉo) = PONĈI < A *punch*.  
 RANDOSERU < *ransel* (tornistro) : en la moderna epoko, reuzata sed  
 en la senco : tornistro de lerneĵaj geknaboj.  
 RANPU < *lamp* (lampo) : olea lampo el vitro.  
 RENZU < *lens* (lenso)

RETORUTO < *retort* (retorto)  
 ROKAI 盧薈 ← ROE ← AROE < *aloe* (aloo)  
 RŪDESAKKU < *roed-zak* (kondomo) = KONDŌMU < F *condom*.  
 SĀBERU < *sabel* (sabro)  
 SAĈIN/SATEN < *satijn* (atlaso) = Jp *šusu*. [Kp. ŜUĈIN < Pt ✓  
 SAHURAN < *saffraan* (safrano) [setim.  
 SERU/セル地 SERUĴI < *serge* (serĝo)  
 SOPPU < *sop* (supo) = SŪPU < A *soup*  
 SUKOPPU < *schop* (ŝovelilo)  
 SUPOITO < *sput* (enŝprucigilo)  
 SUTORIKINĪNE < *strychnine* (striknino)  
 † ŜAMICU ← 舍密 SĒMI < *chemie* (kemio) → Jp *kagaku* (化学).  
 ŜARIBECU 舍利別, sinonimo de ŜIROPPU (vd ĉi-sube).  
 ŜIROPPU ← ŜIRŌPU < *siroop* (siropo)  
 TARAPPU < *trap* (ŝtuparo, eskalo) : origine por ŝipo, sed nun ankaŭ ✓  
 TENTO < *tent* (tendo) [por aviadilo.  
 ZUKKU < *doek* (kanvaso)

## N O T O J

1) HATORON-ŜI estas tre populara vorto uzata de fakuloj kaj laikoj kiel la komuna nomo de pakpaperoj produktataj el pulpoj sulfita kaj sulfata. Tiuj el sulfata pulpo estas la pli moderna fabriko, nomata per faktermino KURAHUTO-ŜI < [Sv *kraft* + Jp *ŝi* ] (fortopapero). Sed pri la etimologio de HATORON diras kelkaj modernaj vortaroj, ke ĝi estas formo difektita el A : *hard-rolled* (paper). Jen kio estas tre neverŝajna, ĉar la fakto estas, ke ne ĉiuj sed nur malmultaj specoj de HATORON-ŜI estas “forte-rulpremitaj” per kalandrilo por porti brilecon sur unu flanko. Kaj se tiu angla esprimo eventuale signifus : ‘forte-rulvolvita’, mi vetus ke eĉ la ĵurnalpapero antaŭpresa estas en tia rulego ! Mi ne scias, kial la modernaj japanaj etimologoj unuanime apogas sin al tia elpensajo (?) 2 de

2) En “Gairaigo Ziten” (Vortaro de fremdvortoj) de Ŝibe Arakawa, eld. de Huzanbō, 1941, la aŭtoro indikas du fontoverkojn, el kie li adoptis kiel etimon por HATORON-ŜI la anglan : *hard rolled paper*. La referencitajn tekstojn mi ankoraŭ ne legis, sed la titoloj jam montras ke neniu el ambaŭ estas faklibro pri papero : unu temas pri “japana geografio”, kaj la alia pri “libroj kaj manlaboro”.



etimo, dum en la vortaroj pli-malpli klasikaj oni legas la etimologian difinon, ke HATORON devenis de Ho *patroon* (kartoĉo) : ekz-e, “Daigenkai”, eld. de Huzanbō, 1934.

En la manlibro pri paper-industrio 『最新紙業提要』, eld. de Maruzen, 1954, estas presita la nomenklaturilo trilingva (japana, angla, germana) pri paperoj kaj pulpoj. Tie ni trovas inter aliaj terminoj :

Jp : Patoron-ŝi	A : Cartridge Paper	G : Patronenpapier
Kurahuto-ŝi	Kraft Paper	Kraft Papier

Tiu unua termino, kiun mi interlingve tradukos : “kartoĉpapero”, iam estis uzata en la laŭlitera senco : papero el kiu oni faras pulvujojn. Sed ĝi poste fariĝis en kelkaj landoj termino por indiki kelkajn specojn de papero, iom diferencajn laŭ la landoj ; la termino “kartoĉo” (Jp “hatoron-ban”) indikis, kaj eĉ hodiaŭ indikas, la ‘formaton’ de papero, difinitan sed iom varian laŭ la landoj. Sed Jp PATORON venis nek el G nek el A. Ĝi devenis pli frue de Ho *patroon* (kartoĉo) ; kaj kial ne ? — se japanoj siatempe pruntis GEŬĚRU < *geweer* (fusilo) ; KARABIN < *karabijn* (karabeno) ; KANON < *kanon* (kanono) ; HŌISSERU < *houwitser* (haŭbizo) ; BONBEN < *bommen* (bombo) ; MORUĈĪRU < *mortier* (bombokanono) ; PISUTŌRU < *pistool* (pisto), ktp ! Mi estas certa, ke PATORON fariĝis HATORON en la moderna epoko, kiam la pakpaperoj el pulpoj sulfita kaj sulfata fariĝis popularaj tra la lando.<sup>3</sup> La sono de *pa* (patroon) tre povas fariĝi *ha*, kiel PAPPU [ < *pap* (kataplasmo) ] fariĝis HAPPU.

HATORON-ŜI estas tiel komunuza (ja kiel ‘leterpapero’) en nia lando, ke ni bezonas esp-igi ĝin. La reaktivigo de “kartoĉpapero” estus ne nur ankronisma, sed ankaŭ netaŭga, ĉar, kiel dirite, ĝi indikas iom malsamajn specojn de papero laŭ landoj. (Cetere, tiu termino de papernomo aŭ -formato ne estus sufiĉe internacia, ĉar — laŭ mia supozo — ĝi ne estus uzata en latinidaj landoj.) Mi do rekomendas kiel komunan vorton la formon *pakpapero*, ĉar, fakte, ĉiaspecaj paperoj, kiuj estas nomataj HATORON-ŜI, senescepte apartenas al la kategorio de “pakpaperoj”. Kaj en la okazoj, se ni bezonas dis-

3) Tia reaktivigo de arkaikaj pruntvortoj cetere okazas ne malofte por indiki novajn aferojn : RANDOSERU < *ransel* (tornistro) — tiu termino, kiu estis pruntita iam en la daŭro de ŝoguna regado, sed kiu neniam estis pruntita de la tennoj armeoj, komencis esti uzata en la moderna epoko nur kiel la nomo de tornistro de geknaboj ; la jam delonge arikaika EREKI (elektro) nun estas reuzata kiel : EREKI-gitā (elektra gitaro), ktp.

tingigi ilin laŭ la specoj ni povus uzi la sciencajn terminojn : *sulfita pakpapero* (pakpapero el sulfita pulpo ; necesas diri : pakpapero, ĉar ne ĉiuj paperoj el tiu pulpo estas tiaj), kaj *sulfata papero* (papero el sulfata pulpo). Tiun ĉi lastan ekvivalentas la supre-cititaj *A Kraft Paper/G Kraft Papier*. Laŭ la manlibro, kraft' estas de Sv *kraft* (forto), ĉar la unuan fojon oni sukcesis fari sulfatan pulpon en Svedujo kaj nomis ĝin per tiu termino. Mi supozas ke ĝi estas nuntempe sufiĉe internacia kiel la nomo de papero aŭ pulpo. Mi do proponas enkonduki ĝin ankaŭ en nian lingvon por formi fakterminojn : *kraftpapero/krafta papero* aŭ *kraftpulpo/krafta pulpo*. Ekz-e : Ciment-sakoj estas farataj el kraftpapero.

(La terminoj “sulfato” kaj “sulfito”, ambaŭ estas troveblaj en la Vortaro de Nukina kaj Miyamoto; sed en la Vortaro de Mijake — nur “sulfato”, sed ne “sulfito”.)

2) KARINTŌ eĉ ne estas traktata kiel ia pruntvorto en la vortaroj, kiujn mi konsultis. Tamen unu aŭtoro mencias ke la kuko disvastiĝis el Nagasaki ; supozante ke ĝi venis el Ĉinujo, li atribuas al ĝi la etimon KARIN, japana nomo por ĉina cidonio (*Cydonia sinensis*) nur tial, ke, kovrita per melaso, ĝi portas koloron similan al la ligno de ĉina cidoniarbo. Ŝajne bela solvo.

Sed mi havas kelkajn fortajn motivojn por konsideri la kunmetaĵon KARINTŌ 花林糖 transliterita el Ho *kringelen* : 1) en mia naskiĝurbo Ōtu (kie okazis la 21-a Kongreso de TEJO, 1965) iam troviĝis butikoj nomata “Orandaja”, kie oni produktis la kukon “oranda”, t. e. fritita seka kringo (el pastoringo kunpuŝita en formo de ia dufingreto kaj tordita spirale) kaj ĝiaj variaĵoj estas konataj sub la nomo KARINTŌ vaste tra la lando ; 2) la sono de fremda *krin* en la malnova tempo povis fariĝi KARIN, kiel *kraan* → KARAN, (ankaŭ : *glas* → GARASU) ; 3) la hibrida kunmeto el vort-stumpo (*krin* < *kringelen*) plus *tō* 糖 por la nomo de sukeraĵoj havas precedencon en la kunmetaĵo ARUHEITŌ 有平糖 < [Pt *alfeola* + *tō*], kiu, siavice, havas samtipan kunulon : KONPEITŌ 金米糖 < Pt *confeito* ; 4) se el tiuj tri inĝeniaj kunmetaĵoj nur KARINTŌ forgesigis sian propran praformon, tio okazis probable pro tio, ke la sono “karin” aŭ “kari” estas japana onomatopeo de krakena krakbruo inter dentoj, tiel ke la nomo de tiu kuko iel sonas japane : kraksukeraĵo. Jen la motivoj, el kiuj mi konkludas, ke KARINTŌ devenis de nederlanda vorto.

Tiun mian solvon(?)<sup>4</sup> mi ŝuldias unuarange al E-a vorto *kringo*, en kies sono mi intue travidis la probablan etimon de KARIN. Sed por elserĉi ĝian ekvivalenton en la nederlanda (parenca al *G Kringel*, *Sv kringla* k.a.), mi bezonis iom longan tempon. La malkovron de Ho *kringelen* kiel la nomo de 'kuketoj' mi dankas al la afabla kunlaboro de Naokazu Kawasaki. Li unue respondis al mi, ke la E-Woordenboek de Straaten donas por *kringo*: *kransje* (*koekje*); sed laŭ Straaten, Ho *kring* signifas 'rondo, cirklo' kaj *kringelen* signifas 'sin volvi spirale'. Li promesis pluan enketon. Post kelkaj tagoj li faris specialan viziton al la Universitata Biblioteko (ĉar li nun libertempas trasomere) por enketi la aferon. Kaj li donis al mi la respondon (per let. 17 VII), ke Ho *kringelen* signifas: 2) ringoformaj kuketoj el tri-tikofaruno, butero, sukero kaj cinamo (Van Dale's Nieuw Groot Woordenboek der Nederlandse Taal bewerkt door Dr. C. Kruyskamp en Dr. F. De Tollennaere. 's Gravenhage. 1950). Jen la ĝusta vorto, kiun mi bezonis! Sed mia amiko aldonis: "Tre varme. 30 minutoj da busveturo — serĉado en la biblioteko — 30 minutoj da busveturo — tio lacegigis min, eĉ hejme miaj haŭtoj kovriĝis per ŝvito"! Ho ve, eĉ senmove! mi ŝvitas kaj anhelas pro intensa varmo: la termometro montras 35° C., posttagmeze la 18. VII '67. Koregan dankon!

3) Mi iam publikigis artikolon sub la titolo "Kelkaj portugalaĵaj vortoj japaniĝintaj", kun la listo de ĉ. 30 tiaj terminoj.<sup>5</sup> En ĝi mi faris komenton, i.a.: "Krome, mi mem kribris kaj ellasis kelkajn vortojn, kies originaj formoj ŝajnis al mi ne-aŭtentikaj. Ekzemple, en unu libro mi legis, ke BURANKO (trapezo ludaparata) devenas de Pt *balanco* (tiel presita anstataŭ *balanço* pro manko de preslitero kun cedilo). Sed laŭ la japana-portugala vortaro, kiun mi konsultis, BURANKO estas "baloiço; redoiço". Egale, ĉu "balanço" (balancigo, balanciĝo), aŭ "baloiço", ba ne povus fariĝi "bu" kaj ĉo ne povus fariĝi "ko" en la japana. Tial mi forigis ĝin

4) Ĉar mi ne estas kompetenta filologo nek specialisto en la etimologia studo de fremdvortoj en la japana, mi promesas, ke, se iam montriĝos, aŭ ke tiu mia solvo estis jam farita de iu alia, aŭ ke tiu solvo estas erara, tiam mi volonte faros pri tio raporton en nia revuo.


5) En "Oomoto", N-ro Nov.-Dec. 1958. Krome, la koncerna artikolo: "Japanaj vortoj en eŭropaj kaj aliaj lingvoj" en N-ro Marto-Aprilo 1959; ĝia "daŭriĝo" en N-ro Majo-Junio 1959.

el mia listo, des pli ke ŝajnis al mi, ke BURANKO devenas de la japana *pend*-imita esprimo “buran”, uzata pri ĉio, kio estas pendanta, kiel la mal-espere pendantaj brakoj de homo, simio pendanta de arbo-branĉo, homa korpo pendanta post sinpendigo, ktp”.

Depost tiam aperis du japanaj vortaroj de fremddevenaj vortoj: A) “Gairaigo Syōziten” (Vortareto de pruntvortoj) de Yoshio Ogaeri (eld. de Kenkyusha, 1959); B) “Gairaigo Ziten” (Vortaro de pruntvortoj) de Minoru Umegaki (eld. de Tokyo-do, 1966).

Estas interese rimarki, ke en A) oni trovas ankoraŭ BURANKO: difektiĝo el Pt *balanco*. Sed en B) la aŭtoro metas signon? pri tiu etimo, kaj faras mallongan komenton per proksimume sama parolturno kiel la mia.

*T. Nakamura*



“Ni juras persiste disvastigi Esperanton...”

Ni plezurege vin sciigas pri soleno okazinta la 11-an de majo ĉe Fundação Getúlio Vargas, en Rio de Janeiro, kies patrono estis la Ambasadoro de Israelo, Diplomato Shmuel Divon.

La 45 gelernantoj — Grupo ZALMAN SHAZAR — ricevis atestojn de E-kursoj, kiuj funkciis ĉe la menciita organizo kaj Centro de la Studentoj de Maranhão, sub la aŭspicio

de nia Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

Nuntempe multaj personoj venas amase al niaj kursoj dank’ al la granda helpo de la gazetaro, TV kaj radistacioj.

**BRAZ COSENZA — Prezidanto  
KULTURA KOOPERATIVO DE  
ESPERANTISTOJ**

Rio de Janeiro, Brazilo.



parolas s-ro Shmuel Divon

# Salono

## de niaj

### legantoj

S-ro H.W. Holmes (Londono) :

En la artikolon “Spiritismo en Versoj”, kiu aperis en la ĵus ricevita “Oomoto” mar-apr. 1967, enŝteliĝis grava miskompreno kiun mi devas korekti, ĉar ĝi povus rabi de iu la okazon ricevi spiritkuracadon.

Estas al mi granda honoro ke, en la artikolo, Iŝmael Gomes Braga, la eminenta pioniro de Esperanto kaj Spiritismo en Brazilo, amplekse pritraktas la enhavon de mia poemo en “Utafesta Poemaro”.

La poemo priskribas la psikesplore laboron faratan de la Esperanto-Spiritista Societo en Londono.

Gravega parto de tiu laboro estas kuracado, kiun faras la spirito Helias kun grupo de spirithelpantoj.

La artikolo diras : “oni povas kuraci nur kiam la malsanulo mem petas”. Feliĉe ĉi tio ne estas ĝusta. Fakte, plej elstaraj estas la okazoj, kiam Helias kuracas pacient(in)on, kiu ne scias ke li aŭ ŝi estas traktata.

Ekzemple, iu petis al Helias pritrakti sinjorinon en fora lando, kiu estis tute nekonata al la mediumo aŭ al la cetero de la rondo. La sinjorino dum kelkaj jaroj ne povis movi sin el sia seĝo kaj kiam ŝi sentis emon piediri kaj eĉ kapablis promenadi en

la urbo ŝi vizitis la preĝejon por danki al la Virgulino pro sia mirakla resaniĝo. Ŝi tute ne petis por kuraco kaj eĉ ne sciis ion pri Helias aŭ ke Helias pritraktis ŝin. Kompreneble la petinto en Londono minimume unu fojon ĉiutage mense petis helpon kaj kuracon por ŝi.

Tiel estas. Nur necesas ke iu aŭ iuj prenu sur sin la respondecon regule mense peti ke Helias kuracu iun, kaj laŭ sia kapablo Helias tion faros. Kompreneble, se ankaŭ la paciento mem petas kuracon, tio donas eĉ pli da mensa forto al Helias. Eĉ ne necesas ke oni informu nin en Londono pri la farata peto por kuraco, sed, kompreneble, se oni tion faras foje, Helias povas en la rondo sugesti rimedojn, kiuj plirapidigos la kuracon.

Tamen se la paciento estas longdistance for de tiu kiu petas kuracon por li, multe helpas al Helias, se la petanto povas ankaŭ trovi iun (aŭ iujn) en la proksimeco de la paciento, kiu ankaŭ pretas fari regulan peton kaj raportojn pri la progreso de la paciento.

Kiel mi klarigas en la poemo, Helias ne deziras ke oni diru la simptomojn de la malsano, ĉar se la diagnozo estas ĝusta, tio estas kuraĝiga al la petanto kaj indikas ke Helias kontaktis la ĝustan malsanulon.

Mi bedaŭras ke eble la konciza priskribo en la poemo kondukis al la miskompreno.

Jen estas la 22-a strofo en “Utafesta Poemaro”, p. 52 : —

*Ne nur al paciento en la rondo  
Sed ien ajn sur ter' — en spiritmondo  
Laŭ nia peto help' al iu iras.  
Se helpon ankaŭ tiu mem aspiras  
Aldone forta spiritpovo estas,  
La sekvoj kun certec' sin manifestas.*

Vi rimarkos el la supra strofo ke eĉ por personoj en la spiritmondo oni povas peti de Helias helpon, ĉar ankaŭ ili havas siajn malfacilaĵojn. Konstrua pozitiva penso tia estas multe pli helpa al la mortinto ol vizito al la tombejo kie estas lia kadavro. Via sincere,

\*

S-ro Erasmus Zilles (Germanio) :

Ĉiam volonte mi pensas al mia vizito antaŭ kelkaj jaroj en via bela loko. En la pasinta semajno mi ricevis la numeron 319/320, 1967. Ĝi tre plaĉis al mi. La artikolon "*Japana Socialista Partio projektas enkonduki Esperanton en la ĝeneralan edukadon*

*en Japanujo*" mi tuj metis en mian vidkeston antaŭ la domo (mi loĝas en la ĉefstrato de Neustadt). Mi donis la germanan tradukon sur folio kaj multege da homoj legis la artikolon.

Ankaŭ la foto-paĝon de la "*Ĉe speciala aŭdienco: PAPO VI*" mi samtempe donis en la vidkeston antaŭ la domo. Eble vi povas vidi sube de tiuj ambaŭ ankaŭ du bildkartojn de Japanio. La aliaj estas poŝtkartoj el Monako, Anglio, Israelo, Tunizio kaj Indonezio. Ĉiusemajne mi ŝanĝas la enhavon de mia vidkesto ĉar mi havas geamikojn preskaŭ en la tuta mondo.

Kompreneble se iu el miaj japanaj geamikoj vizitos Germanion li povas esti mia gasto. S-ro Syuzi Matuda el Kanazawa-si vizitis nin en la pasinta jaro. Ankaŭ al s-ro Acuĵi Ise en Hiwasa mi skribis jam en februaro.

\*

S-ro D. MacGill (Nov-Zelando) :

NZ Esp-Asocio organizis konkurson pri glumarkoj por niaj kongresoj ktp., eble ankaŭ afiŝoj. La konkurso estis por lernejoj elementaj kaj mezaj. Ni ricevis proks. 30 el 6 aŭ 8 lernejoj kaj ili estis juĝitaj de artisto kaj ni donis la premiojn. Oni elmontris ilin ĉe nia kongreso ĉe Dunedin, kaj tagĵurnalo faris bildon kaj prezigis. Pro tio ke estis mia filino kiu aperis en la foto, mi mendis kopion, kaj poste la loka gazeto "*Upper Hutt Leader*" ankaŭ presis, ĉar ĝi montris lokan esperantistinon.

Nun alia afero : mi vizitis Japa-



La vidkesto antaŭ la domo de s-ro E. Zilles



F-ino S. Gotoo en la 52-a U. K.

F-ino MacGill en la foto aperinta en "Dunedin Evening Star" nan Societon de Nov-Zelando por la unua fojo. Mi esperis renkonti japanojn tie. Tion faris mia filo Stefan kaj mi, sed ili tute ne estas similaj al tiuj, kiujn mi renkontis en Japanujo kaj eĉ multe malpli ol tiuj ĉe Oomoto. Ili venas de la ambasadorejo kaj de la komercaj firmaoj, kiuj aĉetas kaj vendas en N.Z. Ili ne estas tiel amikemaj kiel japanoj en Japanujo, kaj la N.Z-anoj eĉ malpli: ili tute ignoras novulojn. Sed mi parolis al kelkaj kaj tuj rimarkis, ke mi eraris. Mi diris ke mi estas budhano, kvankam ne el sekto reprezentata en Japanujo. Tio ne plaĉis al ili. Poste, oni montris filmon pri vendado de N.Z-aviando en Japanujo, de firmao Prima, kaj tio diris, ke la plej granda obstaklo por plua vendado estas la Budhana religio! Do, jam mi estas kontraŭulo. Mi ne diris ke mi ankaŭ estas vegetarano. Do mi estis ĝuste en la malĝusta loko. Sed mi esperas fari pli bone estonte.



S-roj M. Star kaj K. Kakehi



F-ino Rie Anzai, Miss Esperanto '67



Plej nova libro el Japanujo !

*Miyamoto masao* :

## **Pri arto kaj morto**

Formato : B 6 ; paĝoj 172 ;

Prezo : 2.50 usonaj dolaroj

Enhavo : La poemaro Manjoo/Post la inaŭguro de la Granda Budho/Zeami/La lasta te-seanco/Tra kamp' sovaĝa/Babilado de Syaraku/La morto de Utamaro/Poeto.

“La libro de *Miyamoto masao* estas duoble bonvena : ĉar ĝin markas la stampo de riĉe dotita verkisto, kaj ĉar ĝia apero plue montras la universalecon de nia lingvo kaj de nia propra kulturo.”

*J. Régulo*

Eldonis : ESPERANTO-KENKJUŜA

87 Macuba, Mija-ĉo, Gamagori-ŝi, Aiĉi-ken, Japanujo

————— Mendu ĉe via kutima libroservo —————

Baldaŭ aperos :

## **60 Tradiciaj Popolkantoj de Japanujo**

en trad. de *Kikunobu Matuba*

kun Muziknotoj kaj Disertaĵo pri la tradicia kanto

“La unua merito de ĉi tiu verko kuŝas kompreneble en tiu parto, en kiu la aŭtoro prezentas, kune kun muziknotoj, la popolkantojn tradukitajn de li *en la formo facile kantebla kaj komprenebla kaj agrabla al la orelo*, kio — kvankam pleonasma, ĉar nepra kondiĉo de ĉiu popolkanta traduko — tamen ne estas plenumita kontentige ĉe pluraj el la ĝis nun tradukitaj de aliaj. . .” El la Antaŭparolo de *T. Nakamura*

Eldono de AMO-AKADEMIO